



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 3

Majo/Junio 1963

IFEF-kongreso en Britio - impona demonstracio

Stoke-on-Trent gastigis 400 kongresanojn

Sub la patroneco de eminentuloj el la tieca publika vivo kaj el la fervoja administracio la 15a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Asocio (IFEF) havis sian lokon tiujare en Stoke-on-Trent (Britio). De la 11a ĝis la 18a de majo 1963 kunvenis 400 kongresanoj el 17 landoj. La Germanan Esperantan Fervojistan Asocion (GEFA) reprezentis 85 gekolegoj, pensiuloj kaj familianoj. Inter la multnombraj aranĝoj, kiuj entute trovis pozitivan eĥon en gazetaro kaj televido, elstaris la solena malfermo kun festparolado de d-ro Lapenna.

Kiam la ŝipstevarado alportis matene la teon al la kajuto, la ondoj surmare estis trankviligintaj. La bordo de la brita insulo alproksimiĝis. Arganoj, haloj, pluvo akceptis la alvenintojn. De sur podestoj kontrolis oficistoj la pasportojn. Doganistoj faris siajn kutimajn frazojn. Pli malpli konscie oni submetis sin al la brita vivostilo.

Antaŭkongreso en London

La plej granda parto de la kongresanoj restis survoje unu aŭ plurajn tagojn en London. La giganta ĉefurbo akceptis ilin senformale kiel

dek-milojn da aliaj ĉiutage alvenintoj. Multe impresis la surstrata disciplino en la trafikiloj, la precize funkcia reto de subteraj trajnoj kaj de duetaĝaj omnibusoj. Kiel trankviliga polo uso funk-ciiis la loka Esperanto-klubo. Ĝi estis haviginta tranokteblecojn en diversaj hoteloj. Estis aranĝita seshora rondveturado (10. 5.), dum kiu granda parto de la vidindaĵoj estis montrataj. Ne estas la spaco mencii ĉiujn vizitajn lokojn, ĉar estis ankaŭ multaj, kiujn ne ĝenis la oftaj pluvoj aŭ eventuala erariĝo. Oni trovis ilin en la parlamentejo kaj antaŭ egiptaj sarkofagoj en la Brita Muzeo. Kiu estis ankoraŭ sufiĉe freŝa, sekvis vespere la inviton de la londona Esperanto-klubo al dancado kaj babilado. Dankon al ĉiuj organizintoj. Ili aranĝis senintence bonsukcesan antaŭkongreson. Dum la irado hejmen, al la hotelo, la stratoj malsekaj pro pluvo respregulis la oranĝkoloran lumon de la lampoj.

Stoke-on-Trent, afabla gastiganto

La plua vojaĝo kondukis nordokcidenten, al la urbo Stoke-on-Trent, kien la esperantistaj fervojistoj estis direktintaj sian atenton jam de unu jaro. Moderna trajno rapidis tra belaspektaj,



La kongresinsigno kiel florbedo

ĉefe kamparaj regionoj. La industria karaktero prezentis sin pli forte, kiam en la graflando Stafford la trajno alproksimiĝis al la finstacio.

Por esti sincera: la unuaj momentoj post la alveno ne vekis la konvinkon, ke agrablaj tagoj atendos la kongresanojn. Fumo kaj malpuraĵoj de dekjaraj estis transformintaj ĉion en tristaspекtajn, grizruĝajn konstruaĵojn. Ankoraŭ ne estis konate, ke la loĝantoj esprimas sian amon al la naturo per multkoloraj florbedoj kaj helaj ĉambroj, ke de jaro al jaro ili klopodas plibonigi la acron per teknikaj helpiloj kaj ke vid-al-vide al fremduloj ilia helpopreteco superus la kutiman britan ĝentilecon. Ili faris agrabla la restadon en privataj hejmoj kaj en la — bedaŭrinde — tro malgrandaj hoteloj. La parko ornamis sin per speciala florbedo en la formo de la kongresinsigno.

Kongresejo en urbodomo

Rimarkinde afabla gesto estis la disponigo de la urbodomo kiel kongresejo. Troviĝis tie du grand-dimensiaj salonegoj. Rapide funkcianta restoracio zorgis pri la bonfarto de la stomako je moderaĵoj. La diversaj fakkunvenoj trovis ĉambrojn, kaj servis ĝiĉetoj de la banko, poŝto kaj libroservo. Filatelistojn surprizis la speciala kongresŝtampo havebla nur en la kongresejo kaj nur sur ekspeditaj poŝtajoj. La unua vespero sabaton (11. 5.) servis laŭ tradicio al la interkonatiĝo. LKK zorgis pri bonludanta muzikistaro. Irlandaj dancoj estis prezentataj per lernantoj, kaj — agrabla spektaklo — virina ligo prezentis harmonian gimnastikon.

Solena malfermo

Dimanĉmatene (12. 5.) la katolikaj kaj protestantaj kristanoj havis okazon viziti la diservon en Esperanto. Poste kolektiĝis en la „Jubilea



Solena malfermo — LKK-estro Barks parolas

Halo“ de la kongresejo proksimume 400 personoj el 17 landoj. Muzikistoj ne ĉeestis, sed multkoloraj floroj ornamis la scenojn, kie krom la IFEF-estaro estis prenitaj sidlokoj honorgastoj el la urbo kaj el la Esperanto-movado. S-ro H. Barks, la estro de la LKK, transdonis la parolon al la IFEF-prezidanto de Jong, kiu kun ĝojo salutis unue la honorgastojn, inter kiuj estis la

urbestro s-ro Beddow kaj sia edzino,
fervoja direktoro s-ro Stuart,
Esperanto-poetino f-ino Boulton,
UEA-ĉefsekretario d-ro Lapenna.

Bonveniginte la kongresanojn el 17 landoj la IFEF-prezidanto substrekis la multvaloran okazigon de Esperanto-kongreso en lando, kies lingvo estas vaste disvastigita en la mondo, kaj deklaris la kongreson malfermita. Kiel simpatian geston la kongresanoj taksis la fakton, ke s-ro Stuart, la fervoja reprezentanto, salutis esperantlingve per ĉarmaj frazoj. Sekvis la salutoj de la landaj delegitoj en jena sinsekvo: Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando. (El Finnlando venis kongresano, sed ne delegito.) Por la Socialorganizo de la Germana Federacia Fervojo transdonis la salutojn la GEFA-prezidanto Gießner. Kelkaj delegitoj uzis la okazon por tuŝi aliajn temojn. Estus utile montri tiurilate pli da disciplino. Salutis la kongreson ankaŭ la urbestro de Nottingham, aktiva esperantisto, krome vigla reprezentantino de SAT kaj la vaste konata poetino Boulton. La ĉi lasta substrekis en tre sprita kaj por ŝi tipa maniero la valoron de Esperanto kiel instrumento de la libera pensado. La klaraj bone gviditaj voĉoj de la Queensberry-Lerneja-Kanthoro donis decan kadron.

Festparolado de Lapenna

Unue en la historio de IFEF faris la festparoladon la eminenta oratoro profesoro d-ro I. Lapenna, ĉefsekretario de la Universala Esperanto-Asocio. Elirante el la ŝajne stagnanta situacio de la Esperanto-movado li venis al la konkludo, ke ne la „ĉirkonstancoj“ decidus pri la plua evoluo. Ekde 1950 UEA provas enpenetri jaŭsisteme en la publikan vivon. La organizo de UEA ricevis laborkapablan strukturon. La membronombro konsiderinde pligrandiĝis. Nuntempe oni instruas Esperanton en 500 lernejoj de 30 landoj. En la Dua Laborplano ankaŭ al la fervojistoj esperantistaj estas donita la bazo por reala faka laboro. Plifortigi la fervojan medion, fondi specialajn komisionojn laŭ la diversaj branĉoj teknikaj kaj neteknikaj, tio estu la celo de tiel impona organizo, kia estas IFEF. Ne nur unu fakprelego estu aranĝata, sed pluraj. Antaŭkondiĉo por ĉia faka



Solena malfermo — UEA-ĉefsekretario Lapenna parolas

laboro estu, ke la kongresanoj regas la Internacian Lingvon kaj konstante uzas ĝin. Oni ne lernas naĝi en la momento, kiam la ŝipo dronas. Pro tio la kongresanoj ne serĉu pretekstojn, por nacilingve konversaci dum la kongreso. Alikaze la komencantoj sentas sin trompitaĵ. Lapenna finis per la aserto, ke la plej granda stelo ne povas anstataŭi la praktikan lingvouzadon.

La tondra aplaŭdo pruvis, ke la festparolado bone trafis la kernon de niaj problemoj. Kantinte la himnon la kongresanaro forlasis la salongon por esti ekstere fotografata.

Redaktoroj inter si

Kiel jam tradicie la landaj asocioj, kiuj regule aperigas organojn kun informa aŭ faka karaktero, sendis reprezentanton al la redaktora kunveno (11. 5.). S-ro Hoen (Nederlando), la redaktoro de la internacia organo, raportis pri „La Internacia Fervojisto“ laŭ teknika, redakcia kaj financa vidpunktoj. Pro tio, ke la plej granda parto de la IFEF-budĝeto estas konsumata per preskostoj, pluaĵ deziro pri ekstera plibonigo kaj pli ofta aperado antaŭkondiĉas altigon de la IFEF-kotizoj.

La landaj redaktoroj raportis pri siaj spertoj. Montriĝis, ke la plejmulto devas mem zorgi pri kontribuajoj. GEFA apartenas dank' al la Socialorganizo al la malmultaj landaj asocioj, kiuj havas presitan organon.

Terminara Komitato antaŭ konkretaj rezultoj

Unu el la plej gravaj laboroj sur faka tereno estas la eldono de fakvortaroj. Post raporto de la landaj komisiitoj pri ilia laboro (16. 5.) la sekva

diskuto kondukis al jena rezulto: IFEF ne eldonos esperantlingvan fakvortaron. La Terminara Komitato sub la gvidado de s-ro Ritterspach (Germanio) daŭrigos la tradukon de la 6000 terminoj el la UIC-fakvortaro. GEFA intencas eldoni fakvortaron esperantan-germanan kaj inverse kun proksimume 2000 terminoj. Surbaze de tio la landaj asocioj klopodos eldoni proprajn fakvortarojn helpe de la UIC-kodonumeroj.

Fakprelego pri internacia temo

La salonego estis plena de aŭskultantoj (17. 5.), kiam s-ro Gießner (Germanio), la komisiito pri fakprelegoj, transdonis la parolon al s-ro Scott. Tiu laŭtleĝis pri la temo „La ligoj de la Britaj Fervojoj kun la kontinento, nuntempe kaj estonte“. La verkisto estis s-ro Pickard de la Ĉefsidejo de la Britaj Fervojoj. La kompletan tekston enhavas la postkongresa eldono de la internacia organo. Germanlingva resumo troviĝas sur paĝo 7 de tiu ĉi eldono. Supozeble dum la venontaj IFEF-kongresoj la nombro de la fakprelegoj kreskos kaj la vizitoj al fervojaj institutoj. Ne la kvanto de la distraj kaj turistaj aranĝoj decidos pri la reputacio de Esperanto, sed la unika eblo utiligi la Internacian Lingvon inter la fervojaj administracioj.

Novaj impulsoj

En nepublika kunveno (13. 5.) la landaj delegitoj pritraktis kun la IFEF-estraro gravajn problemojn de la organizado. La membroadministro, kvankam ĝi estis bonintence enkondukita, troe ŝarĝas la estraron kaj estonte forfalos. IFEF zorgos helpe de d-ro Ferenczy (Hungario), sed provizore sen fiksa regularo, ke por la junularo estos organizataj specialaj aranĝoj. Kiel en ĉiuj aliaj organizoj la junuloj estas niaj posteuloj. Kun plezuro oni konstatis dum tiu kongreso sufiĉe da junuloj.

Vastan lokon prenis la diskuto pri la estonta gvidprincipo. Dum la lasta jaro, kiam la provoj trovi taŭgajn posteulojn por la eksigontaj IFEF-estraranoj kreis diversajn problemojn, speciala komisiono estis proponinta, ke la decidpovo estonte estu en la manoj de komitato, kiu anstataŭos la ĝisnunan delegitaron. Dum la IFEF-estraro plenumos la kurantaj aferojn, la komitato, po unu por 200 IFEF-membroj de unu landa asocio, faros la decidojn pri principaj demandoj dum la tuta jaro. La delegitaro akceptis tiun proponon. Komisiono ricevis la taskon ellabori skizon de la ŝanĝotaj artikoloj 8, 9 kaj 10 de la regularo.

Fruktodonaj laborkunsidoj

La programo antaŭvidis du publikajn laborkunsidojn (15./16. 5.). La pritrakitaj punktoj aperos detale en la postkongresa internacia

organo. S-ro Hoen, la longjara redaktoro de „La Internacia Fervojisto“ ekzigis pro pensiumiĝo. La IFEF-prezidanto honorigis lin per donaco kaj nomigis lin „honoromembro“.

Kiel nova redaktoro de la internacia organo estas elektita s-ro Burgler (Nederlando).

S-ro Lok, kies meritoj estis agnoskataj kun danko, ricevis ankaŭ donacon kaj deklaris sin preta, post insista petado de kelkaj delegitoj, plulabori en la IFEF-estraro kiel asesor.

Denove la diskuto ekflamis, kiam la konsekvencoj de la projektita komitato estis preparolataj. Fine la delegitoj elektis komisionon, kiu sub la afergvidado de la svisa organizo profunde studos la gvidprincipon de IFEF. Sendube necesos forta influo de la landaj organizoj pere de ilia komitatanoj al la principaj decidoj dum la tuta jaro.

Subteno de altranguloj

Evidente konstatebla estis la financa kaj morala helpo de la urbestro al la okazigo de la kongreso. Li disponigis ne nur en la urbodomo la necesajn salonojn, li partoprenis ankaŭ la Solenan Malfermon kaj permesis Esperanto-florbedon en la Hanleyparko. Unu vesperon (15. 5.) ĉiuj kongresanoj estis ŝatataj gastoj en la „Kings-Hall“ ĉe abunda bankedo. Kun sia edzino, kiu kiel urbestrino ankaŭ portis la oran oficĉenon, la urbestro inaŭguris (15. 5.) la „Esperanto-way“ (-vojo). La televido raportis pri tio grandskale. Vere laŭdinda fakto estis, ke la loka gazeto ne nur dediĉis ampleksajn artikolojn al la aranĝoj de la kongresprogramo, ĝi publicis ankaŭ la plej gravajn novaĵojn en Esperanto. Du direktoroj el la fervoja medio, s-ro Stuart kaj s-ro Dow, montris sian simpatian al nia kongreso per speciala akcepto de la delegitoj en la fervoja oficejo. Ekstis vigla diskuto pri fakaj problemoj en harmonia kaj gastema sfero.

Kulturaj kaj distraj aranĝoj

London (13. 5.) la salonego de la Mitchell-teatro estis plenplena por la distra kaj teatra vespero. Denove lernantinoj prezentis folklorajn dancojn en buntaj kostumoj de diversaj landoj, bona ekzercado por kompreni eksterlandan kulturon. Ankaŭ la lerneja ĥoro ĝojigis la aŭskultantojn per nacilingvaj kaj esperantigitaj kantoj. Lernantinoj de artlernejo prezentis memfaritajn modernajn vestaĵojn kaj — kia plezuro — demonstribus, kiamaniere kongresaninoj ne vestu sin, ironia spektaklo laŭ ideo de la poetino Boulton.

El la plumo de la sama poetino devenis la humorplena komedio „Drasta Kuracado“. Ludis membroj de la Nova Intima Teatro-Societo, do profesiaj artistoj, kiuj — laŭdire — lernis sian rolon sen scipovo de Esperanto. Kun plezuro sekvis la kongresanoj la spritajn disputojn inter la ĵaluzo edzo kaj lia edzino, kiu dank' al „helpema“ amikino radikale volas liberigi la edzon de lia ĵaluzeco. „Mi amuziĝis tiel multe dum la prezentado“, diris poste la aplaŭdita poetino, „ke mi ne rekonis mian propran verkon.“

Eble meritas esti menciataj je tiu okazo la vizitoj al la muzeo kaj al la potfarejoj. La kongresurbo estas la centro de la porcelanfabrikado kaj potfarado. Tiu speco de industrio servas al la kulturo kaj komforta vivostilo. Multaj havis la okazon mem rigardi, kiamaniere la porcelano ricevas sian eksteran formon kaj aspekton faman en la tuta mondo. En la muzeo, proksime al elegantaj vazoj, oni regalis la vizitantojn je la fino de la kongressemajno ankoraŭfoje per dolĉaĵoj, sandviĉoj kaj kompreneble teo, afabla gesto de gastema direktoro. Artisto praktike demonstris la potfaradon.

La internacia balo multflanke kontentigis. Eleganta salonego, sufiĉe da spaco por agrable danci sur bonkvalita pargeto, sufiĉe da junuloj kvazaŭ tvist-akrobatoj — sed aliaflanke ne tre ludema muzikistaro kaj tro multe da nacia danco. Kontraste al germanaj kutimoj la kelnerinoj ne interesigis pri trinkaĵoj — feliĉe por la monujo.



Stratsceno en Britio

Ekskursoj

La impresoj pri la kongrestagoj estus nekompletaj sen la turistaj aranĝoj. La ekskursoj apartenas al la programo de ĉiu impona internacia konferenco. Kial la esperantistoj, kiuj ofertas sufiĉe da mono kaj libertempo, ne ekkonu krom la kongresurbo la ĉirkaŭaĵoj? Tiucele LKK estis aranĝinta du duontagajn ekskursojn. La unua (12. 5.) kondukis norden, kie antaŭ 4000 jaroj la tiamaj enloĝantoj faris siajn konstruaĵojn kaj kie estas la fonto de la rivero Trent. Proksime troviĝas la teleskopo „Jodrell Bank“, per kiu la astronautaj flugoj estas observataj. Vespere oni manĝis en la „plej granda dancĉambro de la graflando“ en la idilia Trentham-gardeno.

La dua aŭtobusekskurso (14. 5.) eble iom tro longdistanca konigis la montoriĉan regionon norde de Stoke. Ĉie regis la printempo. Ŝafoj paŝtiĝis. Super vastaj altaĵoj kuris blankaj nuboj. La celo estis la nobla termobanco Buxton, kie ĉiuj vespermanĝis kaj poste ĝuis parkon kaj urbon. Kiel kutime je tiu tempo la nokto venis nur post la 22a horo, tiel ke la kongresanoj povis atingi siajn tranoktejojn ankoraŭ relative frue.

Pluvo kaj vento ofte venis dum nia restado en Stoke, sed unu tagon ĝenis nenio. La suno brilis de italblua ĉielo, kiam la speciala trajno forlasis la stacidomon (16. 5.). Senhalte ĝi lasis malantaŭ si fabrikojn kaj minejojn. Crewe kaj Chester preterflugis. Baldaŭ la trajno estis atinginta la bordon de la Ira Maro. Banlokoj sekvis. Post kelkaj semajnoj, dum la somero, frekventos ilin la maramantaj angloj. Miloj da kampadveturiloj atendis en preparitaj lokoj. En Llandudno, marborda perlo de Kimrujo, samideanoj el Chester salutis kore la alvenintojn. Ili montris la urbon, riĉan je helpasadj hoteloj kaj pensionoj. Kia kontrasto al la kongresurbo! Oni opiniis esti ie en Italio. Omnibusoj cirkulantaj laŭlonge de la duoninsulo malfermis imponan rondrigardon al maro kaj reen al la plej alta monto de Britio. Kiu ankoraŭ pli alten deziris grimpi, piede aŭ per montara tramo el la tagoj de niaj avoj, vidis sin premiita per unika rondrigardo. Aliaj kuraĝis malsekiĝi siajn piedojn en la marondoj, dum grandaj mevoj ĉirkaŭflugis. Ĉie regis gajeco.

Kun iom da melankolio kolektiĝis la kongresanaro ankoraŭfoje. Oni vespermanĝis komune, en la lastan fojon en tiu rondo, kaj iel sentiĝis en la koroj, ke la parolo de „unu granda familio“ ne estas vana inter esperantistoj. LKK-estro amiko Barks direktis siajn adiaŭajn vortojn al ĉiuj. Ŝajnas, ke tiu momento multe rekompencis la antaŭan laboron kaj ĉagrenon. La vicurbestro



Tagmanĝo en la kongresejo

honorigis siajn gastojn per alparolo. IFEF-prezidanto emociis kaj kun danko al la organizantoj malfermis la kongreson. Baldaŭ la speciala trajno veturigis la ekskursanojn reen. Interŝanĝo de adresoj, konversacio pri organizaj problemoj, amindumado, serĉado inter junuloj — jen la fino de tiu belega tago.

Ĝis revido venontjare

Dum la kongreso la delegito de Belgio invitis la 16an IFEF-kongreson al Bruselo (Brüssel). Laŭ la eksteraj cirkonstancoj oni povos atendi plenan sukceson. Stoke multilate ne estis konvena kongresurbo. Precipe la loĝigo kaŭzis ĉagrenon. Sed ni ne scias, ĉu la individua gajno por enloĝantoj kaj kongresanoj ne estis pli profitona en tiel granda urbo kiel Stoke ol en ĉefurbo. Se ni rajtas konsili ion al la venonta LKK, estas pli precize kaj pli frue informi la kongresanojn ol nur lastmomente, kio alikaze kaŭzas ĉiaman ĝenadon de la LKK-anoj. La kongreslibro klare diferencigu inter aranĝoj de la kongresprogramo kaj aliaj aldonajoj. Denove ni ripetis longjaran deziron: la kongreslibro inkluzive la indiko pri la hotelo estu en la manoj de la kongresanoj jam antaŭ la kongreso. Sed reen al la pasinta IFEF-kongreso. Ĝi estis fruktodona en familia sfero. Britio gastigis nin afable kaj multilate surprizis per neatenditaj ĉarmaj gestoj. La plej pozitiva rezulto ŝajnas al ni, ke la reputacio de Esperanto evidente kreskis en urbo de tiel grava lando kiel Britio. La vetero faris sian eblon, eble ni ankaŭ por kontentigi enloĝantojn kaj la senlakan lokan kongreskomitaton. Al ĉiuj ni sincere dankas.

Wesentliches vom Kongreß in England

Der 15. Jahreskongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperantisten-Verbandes fand auf Einladung der britischen Landesorganisation vom 11. bis 18. Mai 1963 in Stoke-on-Trent statt. Unter der Schirmherrschaft des Oberbürgermeisters Beddow sowie einer Reihe Persönlichkeiten des öffentlichen Lebens und der Eisenbahnverwaltung fanden sich 400 Teilnehmer aus 17 Ländern, darunter 85 deutsche Eisenbahner mit ihren Angehörigen, zu zahlreichen Veranstaltungen fachlicher, kultureller und touristischer Art ein.

Als Kongreßgebäude hatte die Stadtverwaltung ihr Rathaus zur Verfügung gestellt. Dort fanden die meisten Veranstaltungen statt. Die Post gab einen Sonderstempel heraus. In der **Eröffnungssitzung** wies Prof. Dr. Lapenna, der Generalsekretär des Esperanto-Weltbundes, auf die Notwendigkeit hin, Esperanto verstärkt für fachliche Zwecke einzusetzen. Die Eisenbahner-Esperantisten seien auf Grund ihres Berufes hierzu besonders berufen.

Als Thema der gut besuchten **Fachvorlesung** war „Die Britischen Eisenbahnen und der Kontinent — heute und morgen“, gewählt worden. Eine Zusammenfassung befindet sich auf Seite 7. Es besteht Aussicht, daß auf den kommenden Kongressen zumindest zwei Fachvorlesungen in Verbindung mit dem Besuch eisenbahntechnischer Einrichtungen abgehalten werden. Der Ausschuß für das **Fachwörtertum** beschloß, durch die einzelnen Landesverbände ein Fachwörterbuch mit etwa 2000 Fachausdrücken herauszugeben. Der deutsche Landesverband rechnet in absehbarer Zeit mit der Drucklegung eines derartigen Wörterbuches in Deutsch-Esperanto und umgekehrt. Die **Schriftleiter** der Landesorgane tauschten ihre Erfahrungen aus. Erfreulicherweise hat sich das äußerliche Bild sowie das Niveau der Landesorgane gebessert. Leider läßt die Mitarbeit aus den Reihen der Mitglieder zu wünschen übrig.

In mehreren **Arbeitssitzungen** befaßten sich Vorstand und Delegierte mit organisatorischen Fragen. Die besondere Fürsorge soll der Jugendarbeit gelten. Die jugendlichen Teilnehmer haben seit zwei Jahren ein teilweise eigenes Kongreßprogramm. Einige Mitglieder des IFEF-Vorstandes scheiden wegen beruflicher Pensionierung aus. Mit Hilfe eines ganzjährig arbeitenden Komitees aus den Reihen der Landesorganisationen soll sichergestellt werden, daß zukünftig im Arbeitsablauf, besonders bei wichtigen Entscheidungen, keine Verzögerungen auftreten. Die Auswirkungen auf die Satzung wird besonders untersucht.

Während der Kongreßwoche wurde eine **Esperanto-Straße** eingeweiht. Hierüber berichtete das Fernsehen. Die Zeitungen nahmen täglich regen Anteil am Kongreßgeschehen und gaben die wichtigsten Nachrichten in Esperanto heraus. Im Stadtpark wurde ein Blumenbeet mit dem Kongreßemblem errichtet.

Die besondere Bedeutung von Stoke-on-Trent liegt in seiner **Porzellanindustrie**. Auch das Kongreßabzeichen bestand aus Porzellan. Viele Besucher hatten Gelegenheit, derartige Betriebe zu besichtigen. Früher wurde bei der Porzellanherstellung sehr viel Schmutz auf die Stadt abgeladen. Heute hat sich im äußeren Bild schon manches gebessert.

Als Ausgleich für den Aufenthalt in einer Industriestadt dienten **zwei Halbtagsausflüge sowie ein Ganztagsausflug**. Die Omnibusausflüge erschlossen die Schönheiten der Frühlingsskulpturen strahlenden Umgebung. Einsame Höhen mit vereinzelt Bauernhöfen wechselten mit freundlichen Kurorten ab. Die ganztägige Sonderzugfahrt führte zu dem bekannten Badeort Llandudno an der Irischen See. Die sonst zurückhaltende Frühlingssonne gab den Blick auf das gebirgige Landinnere frei und auf ein südlich erscheinendes blaues Meer. Möven kreisten über dem noch einsamen Strand. Im Beisein des dortigen Bürgermeisters fanden die Kongreßtage dort ihren Abschluß. Hierbei wurde zum 16. IFEF-Kongreß 1964 in Brüssel eingeladen.

Der 15. IFEF-Kongreß kann als gelungen betrachtet werden. Die Bevölkerung zeigte sich aufgeschlossen und beeindruckt. Ihr gastfreundliches Verhalten war herzlich und führte zu zahlreichen freundschaftlichen Verbindungen. Behörden und Öffentlichkeit unterstützten den Kongreß in jeder Weise. Andererseits wurden die Vorteile der Internationalen Sprache offenkundig demonstriert.

Es sei auch erwähnt, daß der Esperanto-Klub in London alles daransetzte, um die anfallenden Übernachtungen zufriedenstellend zu regeln. Eine Besichtigungsfahrt mit mehreren Omnibussen ermöglichte den Besuch der Sehenswürdigkeiten der britischen Hauptstadt. Im Klubhaus fand ein geselliger Abend statt.

Ein besonderes Erlebnis bot die Überfahrt mit dem Schiff zwischen dem Kontinent und der britischen Insel.

Die Britischen Eisenbahnen und der Kontinent

— heute und morgen

von S. J. Pickard

Zusammenfassung des auf dem 15. IFEF-Kongreß in Stoke-on-Trent gehaltenen Fachvortrags

Zwischen Großbritannien und dem Kontinent betreiben die Britischen Eisenbahnen vier besonders geartete Verkehre:

1. Fährverkehr für Reisende in den Verbindungen Dover|Folkestone — Calais|Boulogne, Newhaven — Dieppe, Southampton — Le Havre, Southampton — Saint Malo, Harwich — Hoek van Holland. Trotz bedeutender Konkurrenz durch das Flugzeug hat der Fährverkehr von 1951 bis 1962 erheblich zugenommen.
2. Übersetzverkehr für begleitete Kraftwagen in der Verbindung Dover — Boulogne. Als neuestes Schiff ist die „Maid of Kent“ eingesetzt. Sie hat zwei Kraftwagendecks sowie besondere Einrichtungen, die das Anlegen in den Häfen erleichtern.
3. Fährverkehr für Stückgüter und Behälter, auch für Wein, Obst

und Gemüse in den Verbindungen Newhaven — Dieppe, Folkestone — Boulogne, Harwich — Antwerpen|Rotterdam, Goole — Kopenhagen außerdem auf den Passagierschiffen in den Verbindungen Southampton — Le Havre, Southampton — Saint Malo, Harwich — Hoek van Holland.

4. Übersetzverkehr mit Eisenbahn-Fährwagen in den Verbindungen Dover — Dünkirchen, Harwich — Zeebrügge. Das Fassungsvermögen der Schiffe beträgt 38 Güterwagen, in der Verbindung Dover — Dünkirchen außerdem 30 Kraftwagen und 800 Reisende.

Die weitere Entwicklung des Fähr- und Übersetzverkehrs steht vor einigen Problemen. Wegen der

Notwendigkeit, in absehbarer Zeit neue Schiffe bauen zu müssen, erwartet man mit Interesse die Entscheidung der britischen und französischen Regierung darüber, ob die Verbindung zum Kontinent mit einer Brücke oder einem Tunnel hergestellt werden soll. Die traditionellen Verkehrsarten unterliegen auch dem Einfluß neuer Verkehrsmittel z. B. den Tragflügelbooten, die auch auf bewegter See verkehren können. Die Britischen Eisenbahnen verfolgen aufmerksam die weitere Entwicklung und studieren die Möglichkeiten, die neuen Verkehrsmittel ebenfalls einzusetzen.

Die Britischen Eisenbahnen gehen von der Gewißheit aus, daß der Fährverkehr mit dem Kontinent eine günstige Entwicklung zu erwarten hat und damit auch die Beziehungen zwischen Großbritannien und den Ländern des Kontinents gefestigt werden.

Atentu la adreson

Multaj poŝtaĵoj ne atingas nin aŭ nur post longa serĉado, ĉar la adresoj estas skribitaj malĝuste aŭ mallongigitaj. Ni nepre petas, ke vi uzu la adresojn indikitajn en nia BULTENO. La eksterlandaj redakcioj estas petataj sendi sian organon al la adreso de la nuna redaktoro. Por faciligi la sendadon, bv. skribi antaŭ la destinaloko la poŝtnumeron, ĉar en okcidenta Germanio ĉiu loko kun poŝtoŝtelo havas apartan numeron. GEFA

Novaj biletoj

En la internacia pasaĝertrafiko ekzistas ekde la oktobro 1963 novaj biletoj. Ili estas — unuafoje en la historio de la fervojoj

La „birdfluglinio“ funkcias

Ekde la 26a de majo 1963 regule funkcias la fervoja trafiko sur la nova vojo al kaj de Danlando. Post pli ol trijara konstruperiodo efektiviĝis malnova revo de 100 jaroj: la birdfluglinio. (Ni raportis jam pri tio en la n-ro 5/62).

Kiel unua etapo okazis la 30an de aprilo la inaŭguro de la ponto, la ĉefobjekto de la konstruaĵoj. La ponto kuŝas sur sep kolonoj, kies fundamentoj penetris 10 metrojn en la margrundo. La akvovojo estas larĝa 240 m, rondarko tenas en alteco de 25 m la veturŝoseon komunan por fervojo kaj aŭtomobilo.

La 14an de majo la federacia prezidanto Lübke kaj la dana

reĝo Frederik solene inaŭguris la birdfluglinion inter la havenoj Puttgarden (sur la germana insulo Fehmarn) kaj Rödby (sur la dana insulo Lolland).

Malgraŭ la altaj investitaj sumoj de proks. 231 milionoj gm la ĝenerala trafiko multe profitos per la mallongigita vojo inter Skandinavio kaj la kontinento. Ankaŭ la signalaj kaj sekurigaj instalaĵoj estos novkonstruataj laŭ la plej moderna sistemo. La tuta linio estos poste direktata de la centra regadejo en Lübeck kompetenta por la linio de 19 stacioj inter Lübeck kaj la pramhaveno Puttgarden.

W. B.

de Eŭropo — unuecaj. Diversaj preskriboj el la jam kreita „Komuna Internacia Tarifo por la Transporto de Personoj kaj Pakajoj“ estis tiucele ŝanĝitaj. Estonte la skribado de la internaciaj biletoj faciligos. Ĉiu tiaspca bileto havos kajeritan formon, sed la unuopaj kuponoj egalos kontraste al la iama formo. Ankaŭ la internacia liberbileto ricevos alian formon. Konekse kun tiu ŝanĝo finiĝis ankaŭ la apartaj kontraktoj de la vojaĝagentejoj kun la fervojaj administracioj eksterlandaj.

Pro la grandkala ŝanĝo la unuopaj fervojoj enkondukis la novajn biletojn je diversaj limdatoj. La Germana Federacia

Fervojo elektis la monaton majo 1963. Por la biletdonecoj tio kaŭzis multe da laboro. W. B.

Laborplano de UEA

UEA prezentis antaŭ monatoj la Duan Laborplanon. Ĝi celas interalie la plivastigon de la Internacia Lingvo en la fakaj medioj. GEFA plene subtenas la efektivigon de la Laborplano kaj alvokas ĉiujn distriktojn, grupojn kaj membrojn plenumi ties postulojn kaj proponojn. Precipe estas dezirinde, ke ĉiu lingvosperta GEFA-ano fariĝu individua membro kaj fakdelegito de UEA.

Anoncoj

Korespondadon kun germanaj fervojistoj deziras
Johano Czako, Boroš Š. u. 40, Senteš, Hungario

Josef Boril, Prazská 9, Hradec Králové IV, Ĉeĥoslovakio
Stefano Balint, staciostro, Kecskemét-Also p. u., Hungario
Esperanta Junulara Grupo, Banyai I. Leánygimn., Kecskemét, Hungario
Miĥaelo Gere, Damjanic u. 2 p., Szentes, Hungario

„ESPERANTO“, poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio

En aŭgusto/septembro apers la Svisa Esperanto-Kalendaro 1964. Mendu ĝin jam nun por vi kaj viaj korespondamiko kun samtempa antaŭpago de 5,50 svisaj frankoj. Po 10 kalendaroj mendiĝas unu plusa ekzemplero senpaga. Eldonanto: Karl-Heinz Mischler, Franklinstr. 29, Zürich 50, Svislando.

La 16a kongreso de Kristana Ligo Internacia okazos en Graz (Aŭstrio) de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1963. Kostoj entute 570 aŭstrajn ŝilingojn. Informojn donas: F-ino Tini Putto, Bennekomsseweg 20, Ede (Gld.), Nederlando.

Okaze de la 36a SAT-kongreso, kies viziton ni rekomendas al ĉiuj GEFA-anoj, kiuj volas partopreni internacian kongreson interne de Germanio, la urbo Hamburg eldonis 16paĝan plurkoloran prospekton en tri lingvoj (pola, ĉeĥa kaj esperanta). Eldonito: Fremdenverkehrs- und Kongreß-Zentrale Hamburg e. V., Hamburg 1.

Antaŭ la 18a Olimpiado en Tokio la japanaj esperantistoj turnas sin al ni petante, ke ni konsilu al la koncernaj aŭtoritatoj la praktikadon de la Internacia Lingvo. Tiuj personoj, kiuj estas kompetentaj eluzi sian influon, estas petataj al kunlaboro kun la celo, ke Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj dum la Olimpiado. Prospekto pri la Nacia Parko Tateyama estas havebla per „Turisma Fako de Tateyama-ŝiŝi, Toyama-ken, Japanio

El la grupoj

Passau. Komence de januaro 1963 la loka grupo startis varbakampanjon kun la celo gajni interesojn por nova Esperantokurso. Estis disdonataj ĉirkaŭ 6000 flugfolioj. Precipe ni akcentis la varbadon inter la fervojistaro. En la oficejoj kaj aliaj ĉambroj de la fervojista administracio ni pendigis varbaĵojn. Krome du anoncoj en loka gazeto informis la geleĝantojn. Fine ankaŭ la varbkesto estis uzata kiel informilo. Intertempe, la 6an de februaro, la kurso estis komencata. Enskribiĝis 9 partoprenantoj. La kurso estas sub la lerta kaj sperta gvidado de la grupestro BOS i. R. sinjoro Thasler.

Ni legis en . . .

BULGARA ESPERANTISTO, organo de la Bulgara Esperantista Asocio, respegulas (en marto) per valoraj informoj la baldaŭan UE-kongreson. Atenton meritas la logike ellaborita gramatika parto.

DEFA-BULTENO de la Dana Esperantista Fervojista Asocio prezentas (en apr.) majo resumon pri la ĝeneral-kunveno en Aarhus. La modele funkcianta redaktado ebligas aktualan kaj ampleksan informadon de la DEFA-anoj.

El Popola Ĉinio de la Ĉina Esperanto Ligo ilustras (en n-ro 2) la historion de la kajtoj, kiuj devenis jam antaŭ du jarmiloj.

Esperanto en Skotlando, eldonita de la Skota Federacio Esperantista traktas (en n-ro 50) la en Britio ŝajne neeviteblan problemon de fantomoj.

Esperanto-letero el Walsrode aperis unuafoje en marto 1963 kun tre sprita kaj konvinka enhavo.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, detale okupigas (en marto) pri la vojaĝvojo al la kongreslando Britio, precipe pri la tramlinio de Hoek van Holland al Harwich. La eldono de aprilo skizas la funkcion de la projektita tunelo inter Francio kaj Britio.

Franca Esperantisto, eldonita de la Unio Esperantista Franca, raportas (en marto) pri la interkomunikaj satelitoj.

INFORMA BULTENO de esperantista klubo en Praha (Ĉeĥoslovakio) aperis unuafoje en jan./febr. Elstaras klara superigardo, koncizaj informoj kaj plaĉa aspekto.

Jugoslavia Esperantisto, organo de Jugoslavia Esperanto-Ligo, atentigas (en jan./febr.) al la internacia konferenco de la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Ĝi okazos en Beograd (28. 7. — 1. 8. 1963).

Jugoslavia Fervojisto surprizas (en n-ro 12/62) per la anonco, ke en 1963 la revuo farigas nur altermonata organo de JAFE.

La Fervojisto, organo de la franca IFEF-sekcio, donas (en marto kaj aprilo) rerigardon al la historio de la francaj fervojoj okaze de la 25jara ekzisto en la nuna jura formo.

Paŝon post paŝo, loka informilo de sveda grupo en Kraftvägen, informas pri la tiea aktiva grupo.

The Worker Esperantist de la brita laborista movado analizas (en marto) en sia jarraporto por 1962 la nunan malfacilan situacion.

Ni invitas niajn membrojn kaj eksterlandajn geamikojn multnombro partopreni nian

7an jarkunvenon en Regensburg la 19/20an de oktobro 1963

En la venonta BULTENO aperos detaloj.